Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 24-an de aŭgusto 2023 per Zoom

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 15-an de junio 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Interna kaj alekstera informado
Douglas petis helpon pri la enpaĝigo de Norvega Esperantisto 2 (2023). Claude kontaktos lin por helpi enpaĝigi kaj eldoni la numeron. La eldonadon de numeroj 3 kaj 4 (2023) ni intencas diskuti en reta kunveno kun Douglas.
Bård faris Esperano-Nytt antaŭ la somero, sed ĝi ankoraŭ ne estas dissendita.
Claude esploros la teknikajn flankojn de ebla estonta reta novaĵletero.
Ni kontrolu la adresaron de la ricevantoj de NE kaj ĝisdatigu ĝin. Sendante minimume 200 ekzemplerojn de NE ni ricevas reduktitan prezon, similan al sendado de proksimume 60 ekzempleroj je nereduktita prezo.

4. Reteno de membroj
Claude provos kolekti la retadresojn de la membroj. La retadresojn ni intencas uzi por eventuala elektronika dissendado de informoj.

Al nepagintaj membroj ni dissendu la antaŭe dissenditan paperan leteron kun propono pagi la membrokotizon. Samletere ni petu retadresojn.

5. Statuta reviziado
Jardar tradukis al nynorsk kaj Esperanto la reviziitajn versiojn de la statuo post la statutŝanĝoj, faritaj dum la landa kunveno. Bård kontrollegis. Jardar alŝutos la novajn versiojn al la retpaĝo.

6. Heredaĵo de Ester Olsen
NEL heredis de Ester Olsen 191 392,74 kronojn. La mono nun troviĝas en la ordinara bankkonto de NEL. Al la uzo de la mono ne estas ligitaj certaj kondiĉoj.

7. Eventualaĵoj
Pri distribuado de Norvega Esperantisto: La presejo ofertas ankaŭ distribui membrogazetojn. Ni petu al Judith esplori la kondiĉojn de tiu servo.

8. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 21-an de septembro je 20.30.

Antaŭ tio ni provu aranĝi retan kunvenon kun Douglas pri la eldonado de Norvega Esperantisto kaj aliaj oficejaj demandoj, prefere kiam Marianne estos en Oslo ĉi-aŭtune. Marianne proponos daton.

Protokolis Marianne Lund